

D

M.E.


★

1978

internacia pedagogia

REVUO

Photo U.N.E.S.C.O.



Eric SCHWAB n° 4.930

Internacia pedagogia revuo

(eks *ESPERANTO* kaj *KULTURO*; *Internacia Pedagogia Revuo*)

Aperas dumonate sub la aŭspicioj de G.E.E., franca asocio de esperantistoj-educistoj

NIA KOVRILFOTO

Lernanto kaj instruisto en lernejo de franca Togolando (1952)

ENHAVO

- Paĝo 50. — **Maria Montessori** (Prof. Musella).
 — 52. — **Franca ŝtata instruado** (F. Cadenel).
 — 54. — **Neologismoj** (R. Rakuŝa).
 — 57. — **Esperanto en la lernejoj**.
 — 59. — **Ĉu enkonduki esperanton ?** (F. Novljan).
 — 60. — **I.L.E.I.**
 — 61. — **Nia diskutejo**.
 — 62. — **Sur vian librobretan**.
 — 64. — **Somera Esperanto-seminario** (Prof. Kondor).

Cion por la redakcio: artikoloj, informoj, recenzotaj libroj, oni sendu al la **Redaktoro:**
 A. ALBAULT, 8, avenue Et. Billières
 TOULOUSE (Francio).

Cion pri administrado: abonoj, provsendoj, specimenoj, oni sendu al la **Administranto:**
 DELAGNEAU, Avrolles
 par ST-FLORENTIN (Yonne) - Francio.

ABONO: 500 fr.F. pojare: vidu 3-an kovrilpaĝon.

Anoncetoj, reklamoj, oni sendu al: F-ino G. JOUBERT, 21, rue Regnault, SAINT-QUENTIN (Aisne) - Francio. P.C.K. LILLE 3041-30.

TARIFO: Anoncetoj; 6 fr.F. = 0,20 stelo po vorto aŭ mallongigo.

Reklamoj: 1/1 paĝo 5.000 fr.F.
 1/2 paĝo 3.000 fr.F.
 1/4 paĝo 1.600 fr.F.
 1/8 paĝo 900 fr.F.
 1/16 paĝo 500 fr.F.

Rabato 10 % por sama teksto en 2 numeroj.
 20 % por sama teksto en 3 numeroj.

Ciu materialo por difinita numero devas atingi la koncernan adreson antaŭ la 20^a de la antaŭa monato.

La revuo aperos fine de Januaro, aprilo, julio, novembro.

Al la legantoj de Internacia Pedagogia Revuo



Vi bone scias ke tiu revuo aperas de tri jaroj kaj vi sendube rimarkis ke, dum la lasta jaro, la aspekto de la revuo multe ŝanĝiĝis. Mi deziras memori al vi la etapojn de tiu evoluo, kiu estis al vi klarigita iom post iom, sed kies resumo estas necesa same kiel konsciencekzameno.

Principe, internacia revuo por instruistoj estas necesa en la esperantista mondo, kie la instruistoj estas tre multnombraj, kaj kie ekzistas jam aliaj fakaj revuoj. Sed pro financaj malfacilaĵoj, la efektivigo de tiu racia projekto estas malfacila. Tial la faka asocio de francaj instruistoj, unue prezentis tiun internacian revuon kiel parton de sia propra interna revuo : « Esperanto et Culture ». La elspezoj por la eldonado de tiu internacio revuo, por internacia publiko, estis pagitaj grandparte, de la francaj esperantistaj edukistoj. Nia celo estis konigi la kernon de nia revuo, ĝian enhavon, ĉar la prezentado estis tiam malperfekta.

Lastan jaron, de januaro 1958, ni provis vere naski la revuon kiu ricevis pli belan aspekton, kaj fariĝis sendependa. Vi bone scias ke la aspekto ludas gravan rolon por la uzo de la revuo kiel propagandilo, kaj la sendependeco devis iam esti provita.

Teknike, la rezulto estis bona, sed finance ne. GEE pagis la eldonon, sed la abonoj ne estis sufiĉe nombraj, kaj, el iuj landoj, la mono ne povas veni. Tial la defcito estas nun tia-ke GEE ne povas pagi la ses numerojn antaŭviditajn ; tiu kvara numero estos la lasta por la jaro 1958.

Tamen, ni daŭre opinias ke internacia pedagogia revuo devas ekzisti. Por 1959, ni projektas la eldonon de kvar numeroj je la risko ankoraŭfoje de GEE ; ni bone scias ke tio estas malmulta, tial ni petas vin por helpado. Kiel ?

1) Per pligrandigo de la nombro de abonoj. Propagandu senĉese apud la esperantistaj instruistoj, klarigu al ili ke kiel esperantistoj ili devas viviĝi esperantistan literaturon, kaj ke kiel fakuloj, ili devas viviĝi la publikaĵon de sia fako. Pagu propagandajn abonojn por personoj kies adresojn vi sendos al ni.

2) Per faciligo de mona migrado. Pagu abonojn por viaj korespondantoj kiuj loĝas en landoj el kiuj la mono ne povas atingi Francion.

3) Helpu finance, per donacoj aŭ pli alta kotizo.

Niaflanke, ni daŭre serĉos rimedojn por utiligi nian monon blokitan en pluraj landoj, kaj por eldoni la revuon plej malmultekoste.

Ni deziras ne nur pluan vivadon de la revuo, sed ĝian revenon al pli ampleksaj kaj pli oftaj bultenoj, sed por atingi tiun celon, kiu estas la nia kaj kiu devas esti ankaŭ la via, ni bezonas vian helpon, laŭ konsilitaj formoj. Sincerajn antaŭdankojn.

La prezidanto de GEE

F. BOYET.

MARIA MONTESSORI KAJ ŜIA DIDAKTIKA METODO

(dissendita el Radio Roma la 12an de novembro 1957a)



Antaŭ kvindek jaroj la mondfama itala pedagogiistino Maria Montessori, tiam 37-jara, fondis en Romo la unuan porinfanan hejmon (« Casa dei bambini »), organizitan laŭ ŝia nova didaktika metodo.

Naskiĝinta en Chiaravalle (provinco de Ancona) la 31an de aŭgusto 1870a, Maria Montessori doktoriĝis en Romo ĉu pri medicino, ĉu pri natursciencoj, ĉu pri filozofio. Ŝi estis la unua itala kuracistino, kaj, kiel, socia kuracistino, ŝi alportis tiun misian spiriton, kiu karakterizas ŝian tutan personecon.

En 1897a ŝi partoprenis medicinan kongreson en Torino, kaj tie ŝi emfazis la teruran respondecon de la socio ĝenerale kaj de la kuracista klaso speciale en la lukto kontraŭ la kaŭzoj de la krimeco. Ŝia opinio, unu el ĉi tiuj kaŭzoj konsistis en la manko de taŭga prozorgado al psike subnormalaj infanoj, ofte estontaj krimuloj. Ŝi konvinkiĝis pri la graveco de tia misio, kaj, en la jaroj 1899a kaj 1900a, ŝi sin dediĉis al la studado de la psike subnormalaj infanoj, tra sia instruado kaj sia kuracista praktikado kaj sperto ĉe la ĵus fondita instituto por mense malfortaj infanoj (« Istituto per bambini frenastenici ») en Romo.

Tiam ŝi fiksas la fundamentojn por sia metodo de klasifiko de la malinteligentuloj (« metodo di classificazione dei deficienti ») kiel startopunkton por ilia pedagogia kuracado. Tiu ĉi sperto ŝia estas speciale signifoplena, ĉar, laborante por la subnormaluloj, ŝi sukcesis plivastigi kaj pliprofundigi siajn pedagogiajn esplorojn. Ŝi kreis « ex novo » sian didaktikan materialon por la edukado de la sentumoj, kaj la mirindaj sukcesoj atingitaj malkaŝis al ŝi la senfinajn edukajn eblecojn donitajn de la subnormalaj al la normalaj infanoj.

Estas oportune klarigi iom pli detale tiun ĉi punkton. Por renovigi sur firmaj fundamentoj la edukadon de la normaluloj, estas necese preni kiel bazon la edukadon de la subnormaluloj: jen la principo de la didaktika metodo de Maria Montessori. Ci-sence, la edukado de la subnormaluloj havas ne nur fakan, sed ankaŭ ĝeneralan intereson, ĉar ĝi koncernas ne nur la subnormalulojn, al kiuj ĝi estas destinita, sed ĝenerale la tutan socion. Tio pruvas, ankoraŭfoje, ke la vera fonto de la progreso estas la doloro: la edukado de la normaluloj progresus tre pli rapide, se oni bazus ĝian progreson, laŭ la genia intuicio de Maria Montessori, sur la edukado de la subnormaluloj.

Sia kuracista evoluo komenciĝis tra la studo de antropologio: en 1904a ŝi estis nomita asistantino ĉe la katedro de antropologio de la Roma universitato, kaj en 1910a ŝi publikigis sian « *Antropologia pedagogica* » (= pedagogia antropologio). Tri jarojn antaŭe, ŝi estis fondinta, en unu el la plej popolaj Romaj kvartaloj (San Lorenzo fuori le mura) sian unuan porinfanan hejmon, kie unufoje trovis praktikan aplikon la metodo tiam ellaborita de Maria Montessori, kaj en 1909a ŝi ilustris sian teorion kaj siajn spertojn en sia rapide famiĝinta ĉefverko: « *Il metodo della*

pedagogia scientifica » (la metodo de la scienca pedagogio), kiu vekis vastan intereson ne nur en Eŭropo kaj Ameriko, sed eĉ en Afriko kaj Azio tigrade, ke ĝi estis tradukita en 15 lingvojn kaj signis la komencon de la disvastigo de la metodo Montessori en ĉiuj civilizitaj landoj.

Tuj poste, jen en Italujo, jen en tuta Eŭropo stariĝis kaj multobliĝis lernejoj laŭ la modelo de la Roma lernejo. Samtempe ŝi iniciatis la disvastigon de siaj teorioj, kunigante sian aktivecon kiel sciencistino kaj verkistino kun sia praktika aktiveco celanta krei lernejojn, studocentrojn kaj kursojn por la preparado de geinstruistoj.

En 1909a estis organizita en Città di Castello (provinco de Perugia) ĉe vilao Montesca de baronino Alice Franchetti, la unua nacia kurso Montessori. En 1912a ŝi verkis la libron « *L'autoeducazione nelle scuole elementari* » (la memedukado en la elementaj lernejoj) kaj ellaboris la « *Didattica delle scuole elementari* » (didaktiko de la elementaj lernejoj), bazitan sur la samaj principoj kiel la « memedukado ». En 1913a estis inaŭgurita en Romo la unua internacia kurso por la formado de la geinstruistoj, kurso vizitita de centoj de la geinstruistoj el pluraj Eŭropaj kaj ekster-Eŭropaj landoj. Entute ekde 1913a ĝis 1954a la internaciaj kursoj Montessori organizitaj tra la mondo estis tridek.

La metodo Montessori, disvastigante tiel rapide en ĉiuj kontinentoj, evidentigis pli kaj pli tiun universalan karakteron devenantan de la ekzisto de principoj komunaj al tutmondaj popoloj unuigitaj en la aspiro al la granda socia celo ennaskita en la metodo mem: « liberigi la infanon de la miljara spirita subpremo ».

Tiu ĉi postulo puŝis ŝin en 1939a fondi en Kopenhago (Danlando) socian partion de la infanoj, celantan defendi la rajtojn de la infanoj. Cetere de 1906a ĝis 1952a (jaro de ŝia morto) ŝi pilgrimis de unu al alia angulo de la terglobo, kaj ĉie ŝi lasis la postsignojn de sia genio.

Dum la unua mondmilito ŝi transloĝiĝis de Italujo al Ameriko, kie ŝie starigis porinstruistan kolecion; poste, ŝi estis en Barcelono (Hispanujo), kie ŝi fondis pedagogian seminarion, kiun ŝi direktis dum la tuta militperiodo. Post la milito ŝi transloĝiĝis al Britujo kie ŝi starigis vigan studmovadon. Ŝi revenis al Italujo en 1922a, kaj en 1926a ŝi starigis en Romo la metodan lernejon (« scuola di metodo ») Montessori. Poste, el Italujo ŝi denove iris al Hispanujo kaj, de tie, en 1936a al Britujo, kie ŝi restadis ĝis la dua mondmilito organizante internaciajn kursojn kaj kongresojn. En 1939a ŝi transloĝiĝis al Nederlando kaj de tie al malproksima Hindujo, kie ŝi restadis ĝis 1949a, kreante rimarkindan studmovadon.

Reveninte al Eŭropo, kie ŝia movado estis intertempe daŭrigita de siaj disĉiploj (en Francujo, Nederlando, Italujo, Danujo kaj Germanujo), ŝi revigligis rapide siajn Instituciojn, kies signifon kaj gravecon la milito estis montrinta pli kaj pli klare. Kaj ŝia metodo estas kompletigita kaj etendita de la infanĝardeno kaj de la elementa lernejo al la mezgrada kaj supera lernejo kaj al la universitato; kaj en Nederlando ekfunkciis kvin liceoj Montessori, kaj en Hindujo oni ekparolis pri Universitato Montessori.

La « Internacia Societo Montessori » havas sian sidejon en Amsterdam (Nederlando): kaj ĝuste apud Amsterdam, en Noorwijk am See, Maria Montessori 81-jara mortis la 6an de majo 1952a.

Sed ĉu ŝi vere mortis? Ne, tute ne: ŝia vivo daŭrigos sian iradon ĝis novaj infanoj malfermos siajn okulojn sur tiu ŝi mondo, por kies lerneja edukado kaj socia plibonigo ŝi laboris kaj luktis senripoze dum sia tuta vivo.

D-ro Prof Vincenzo MUSELLA.

La instru-problemoj tra la mondo...



F. CADENEL

KELKAJ KARAKTERIZAĴOJ DE LA FRANCA ŜTATA INSTRUADO

En antaŭaj numeroj de I.P.R.* mi akcentis pri la streĉeco de la ligoj, kiuj kunigas la socian staton al la edukado kaj instruado, pri la influo de la filozofia, politika kaj religia sistemo, kiu inspiras la konstitucion de lando, sur la lernejan sistmon, kiu, en ĝi, funkcias. Proksimume, la lernejoj metodoj kaj progamoj de nacio spegulas ties politikajn instituciojn, ĉar la lernejoj preparas la individuojn por konservi ĉi tiujn instituciojn. Sed la socioj evoluas — kaj, nun, iafoje tre rapide — la lernejoj institucioj, sufiĉe ofte, malfruas la politikan sistemon, kaj okazas, ke la individuoj vivas en socio por kiu ili ne estas pretigitaj.

Ĉi tiu artikolo temos pri la ŝtataj, la publikaj francaj lernejoj. Preskaŭ ĉiuj privataj unuagradaj lernejoj, en Francio, estas religiaj, katolikaj kaj ricevas sian edukan sistemon de klerikaro submetita al la ordono de la papo aŭ al la regulo de la kongregacioj, kiuj posedas ilin.

La helpo, donita de jam dek ses jaroj, de la franca ŝtato al la privata religia edukado de ĉiuj gradoj per diversaj, malkaŝaj aŭ kaŝaj, ministeriaj subvencioj pruvas, ke en Francio la klerikaro retrovas efikan viglecon kaj influon. Kaj la senĉesa malfermo de privataj lernejoj pri teknika instruado precipe, sed ankaŭ por submezulaj infanoj, lernejoj, kies nendirata sed ĉefa celo estas havigi grandajn monajn profitojn al siaj posedantoj, kiuj ricevas oficialajn subvenciojn krom la pago de la familioj, montras ke la francaj politikistoj de la IV-a Respubliko rezignas, almenaŭ parte, la edukdirektadon de multaj francaj *junuoj kaj aĉetas la helpon de la ekleziuloj kaj aferistoj*. Necesas rimarkigi, ke la kontrolo de la ŝtato pri la ĉiugradaj privataj lernejoj estas kvazaŭ nula; se ĝi aplikiĝas, nerekte, per la oficialaj ekzamenoj, pri la nivelo de la studoj, fakte ĝi neniel influas, modifas la edukan, moralan, kaj politikan karakteron de ĝia instruado.

La III-a Respubliko, malfacile kreita de 1870 ĝis 1877 estis savita dum ĝia komenco de fervoraj respublikanoj, kiuj deziris likvidi la malnovan kaj diktatoran imperiestran reĝimon; pro tio ili zorgegis pri la disvatigo de la instruado kaj edukado, precipe unuagrada: ili ne deziris analfabetojn kaj provis formi klerajn balotontojn. Post pasiaj politikaj luktoj, la respublikanoj sukcesis balotigi en 1881 kaj 1882 la leĝojn, kiuj igis la unuagradan lernadon deviga, kaj pro tio, senpaga kaj laika.

La unua karakterizaĵo de la publika franca instruado — unuagrada, duagrada, teknika kaj supera — do estas la laikeco, tio estas la sendependeco pri la religioj. En la francaj lernejoj estas fermitaj porke la familioj povu religia dogmo, por ke estu respektataj ĉiuj filozofiaj opinioj de ĉiuj gepatroj; do ĝi estas tolera, ĝi respektas ĉiujn kredojn ne atakante, ne kritikante ilin por ne kontraŭi la religian instruadon, kiun infanoj povas ricevi en siaj familioj: la jaŭdojn, la unuagradaj lernejoj estas fermitaj por ke la familioj povu sendi siajn infanojn al la katekismo, se ili deziras tion. Plie, la ŝtato ignoras la opiniojn de la instruistoj; inter ili estas katolikoj, protestantoj, islamanoj, racionalistoj, ateistoj, k. t. p.; aliaj aliĝas politikajn organizaĵojn, precipe marksistajn. Kelkaj eble, vole aŭ nevole, enŝovas siajn ideojn en sian lernigadon; neeviteble, senmanka filozofia neŭtraleco malfacile povas esti repektata; ĉiu instruanto, pli aŭ malpli, estas regata de siaj opinioj same kiel li estas de sia temperamento. Sed preskaŭ ĉiam, la ofendoj kontraŭ *la laikeco estas nekonsciaj kaj la konfliktoj kun la gepatroj estas esceptaj*, ĉar ĉi tiuj se ili deziras tion, povas sendi siajn infanojn en religian lernejon.

La dua karakterizaĵo de la franca instruado estas ties respublikaneco kaj demokrateco. Ĉiu registaro deziras plifortigi la reĝimon, kiun ĝi reprezentas; la ŝtataj lernejoj fonditaj de la III-a Respubliko, restarigitaj de la IV-a en 1944, kutimigas la infanojn al la

(*) Vd. IPR 1956 p. 34 kaj 29; 1957 p. 17, 74.

respekto kaj amo de la demokratiaj institucioj per la historia, morala kaj civitana instruadoj ; sed, se la instruoprogramoj rapide estis demokratigitaj, la metodoj evoluis malrapide.

Eĉ hodiaŭ, la klasoj ne estas malmultaj en kiuj, kun kredo, varmo kaj konvinko la instruistoj penadas por ŝatigi de siaj lernantoj la respublikanan reĝimon, kaj samtempe, kondukante kiel tiranoj, ili ne lasas al siaj lernantoj iun ajn liberon, iun ajn iniciaton ; tamen en 1923 la oficialaj instrukcioj konsilis la malrigidigon de la rilatoj inter instruistoj kaj lernantoj per la enkondukado de la « self-government » kaj la sugestoj, kiuj je ĉi tiu dato provis la enkondukadon en nian edukistemon de la principoj de la « novaj » lernejoj, principoj jam nete klarigitaj en la fino de la XIX-a jarcento, sed ankoraŭ ne komprenitaj kaj, precipe, ne aplikataj de ĉiuj geinstruistoj ; kaj la civitana formado de la infanoj malprofitas pro tio.

La tria karakterizaĵo de la ŝtataj francaj lernejoj estas la liberala spirito, kiu inspiras la oficialajn instrukciojn, kies celo estas konsili la instruistojn. La libero lasata al la instruistaro klarigas la diversecon de la uzitaj procedoj kaj metodoj, kaj la diferencoj, kiujn oni povas konstati pri la gvidado de la klasoj. En estonta artikolo mi provos pli longe pritrakti ĉi tiun trajton.

La lasta karakterizaĵo de la franca instruado estas — aŭ pli ĝuste estis ĝis 1914 — ties ŝovinismo ; nun ĉi tiu aspekto multe mildiĝis en la ŝtataj lernejoj. La III-a Respubliko naskiĝis en la malvenko kaj la sufero. Malgraŭ solenaj protestoj de siaj deputitoj, Alzaco kaj Loreno estis, de Bismark, ligitaj al la Germana Imperio. Post 1871, plurfoje, la germanaj regantoj humiligis la Francojn ; plie, la rimarkinda ekono-

mia kreskado de Germanio malkvietigis la francajn industriistojn. La ideo de venĝo, la espero de reveno al Francio de la perditaj provincoj donis al la instruado de la historio akcentan ŝovinismon kaj kontraŭprusan karakteron per kiu la franca generacio de la jaroj antaŭ 1914 estis neforviŝeble markita. Eble, almenaŭ parte, oni povas ekspliki per ĉi tiu spirita stato la heroismon de la francaj batalantoj de 1914-1918.

Post 1920, pro la agado de pli vigla kaj klarvida sindikatismo, pro pli konscia kaj fortika klasospirito, la geinstruistoj, aŭ almenaŭ iliaj gvidantoj defendis kontraŭŝovinistajn kaj internaciajn tezojn, pli ofte bazitajn sur sincera kaj nobla deziro de larĝa internacia interkompreniĝo. Plie, post 1914, same kiel antaŭ, la junaj Francoj estis instruataj en la admirado de sia kolonia imperio ; kaj la civiliza agado, cetere neneadebla plenumita en ĉi tiu imperio de malprofitemaj Francoj, konstante estis ekzaltata.

Nun, la historiinstruado iompostioe evoluas. Al la historio de la reĝoj de Parizo, al la detala rememorigo de la militoj substituigas instruado donanta pli kaj pli vastan gravecon al la loka historio kaj al la grandaj okazaĵoj.

La plivastiĝanta kono de la ĝenerala historio de la popoloj, la multigo de la informiloj, la libera informado, kiu publikas ĉiujn tezojn, la volo senĉese pli akcentita de la historiistoj por doni al sia fako objektivan karakteron, por prezenti senpartie la historiajn okazaĵojn igas ĉi tiun instruadon pli tolerema, pli komprenema kaj, al la ekscesoj de naciismo naskiĝanta kaj ekscitegata (ĉu nuntempe ni ne konstatas en orientaj landoj, floradon de ĉi tiuj danĝeraj naciismoj ?) al la ekscesoj de naciismo, malrapide sekvas la sereneco de la matura aĝo.

F. CADENEL - Marseille.

INSTRUADO pri NENORMALAJ INFANOJ

La gekolegoj kiuj instruas en specialaj klasoj por nenormalaj infanoj estas petataj sendi sian adreson kun informetojn pri sia klaso.

Gekolegoj kiuj povas sendi informojn pri similaj klasoj en siaj lernejoj aŭ urboj faru same.

Sendu ĉiujn informojn kaj adresojn al:

S^{ro} Gabriel MUSSIER - Ecole du Jeu-de-Paume, Moulins (Allier) Francujo

(Nuntempe mi restadas en la Nacia Centro pri Speciala Pedagogio) (en Beaumont-sur-Oise (S.-et-O.) Francujo)

10-an de decembro 1958 = 10-a Datreveno de la Universala Deklaracio
de la Homaj Rajtoj

Rudolf RAKUŜA

Neologismoj kaj la instruistaro

Pri neologismoj oni jam ofte kaj multe parolis, lastfoje dum la publika kunveno de la Akademio de Esperanto en Marseille. La rezulto estis modesta: averto pri troa uzo de neologismoj kaj ripetado de la frazo pri normala kresko de la esperanta vortrezoro.

Ci tiu sintenado sufiĉis ĝis nun, sed komplikiĝis kun la seriozigo de la instruado de Esperanto. La neatento de kelkaj neoficialaj vortoj, kiuj apartenas al la kategorio de sufiĉe oftaj vortoj, kokmencas endanĝerigi la normalan transiron el la fazo de lernado al la fazo de legado de gazetoj kaj libroj, do al la praktika aplikado de Esperanto.

La aserton mi devas pli detale klarigi. La metodiko de Esperanto-instruado evoluigis jam ĝis tia grado, ke por ĉiu instruanto estas memkompreneble, ke al la elementa kurso apartenas la plej oftaj radikoj, ni diru proksimume 600, kaj ke la daŭriga kurso pliampleksigas la kvanton por novaj 1005 ĝis 1400, (komp. R. Rakusa, Instrumetodo por E.). La lernanto disponas nun pri proksime du mil vortradikoj, kio signifas kune kun la derivaĵoj konsiderindan vortrezoron. La mankantaj radikoj estas maloftaj. Ilia senco sekvas aŭ el la frazo mem aŭ oni konsultas laŭ neceso la vortaron. Mallonge dirite, nia lernanto povas malrapide tamen kun ĝuo kaj kompreno legi klasikan Esperanton.

Sed legante nuntempan gazeton, revuon aŭ eĉ nur protokolon, li estas surprizita de esprimoj kiel *agnoski, aŭdaci, eskapi, evento, kontesti, mesaĝo, neglekti, obstaklo, omaĝi, persvadi* k. s. (1). Ĉi tiuj vortoj havas du strangajn ecojn. Unue ili kvazaŭ persekutas kelkajn verkantojn, kiuj uzas ilin pro tio tiel ofte, ke iliaj artikoloj svarmas de ili. Due la kunteksto neniel povas klarigi la signifon de ĉi tiuj vortoj. Nia bedaŭrinda leganto kun surprizo rigardas ilin, miregante, ke li ilin renkontis nek en la elementa nek en la daŭriga kurso. Li scias, ke liaj 2000 radikoj ne ampleksas la tutan esperantan vortaron, sed lin konfuzas la fakto, ke li ne povas kompreni tiujn oftecajn vortojn ĉagrenita, ke la instruanto lin trompis, li eksentas suspekton pri Esperanton entute.

La kerno de la problemo kuŝas en tio, ke temas pri « oftecaj vortoj ». Nin instruistojn de Esperanto (mi parolas kiel instruisto kaj ne kiel akademiano) tute ne interesas neologismoj kiel *fajna, falto, fanto, farbo, fascini, febla, fendro* k. s. Ili aperas tiel malofte ke nia lernanto preskaŭ ne renkontas ilin. Ili do ne rezultigas problemon por la instruado. Ankaŭ la neoficialaj vortoj (kvankam sufiĉe oftaj - komp. Scienca Revuo 1954/3) kiel *aŭto, blufi, cirklo, demonstri, distribui, ekspedicio, filmo, ĝangalo, kino, komenti, kulmino, mistifiki, obsedi, prelego, surfaco, ŝoki, tereno, trajno, vilao* k. s. ne kaŭzas problemon, ĉar ili estas parte internaciaj vortoj kaj parte la signifon oni povas facile diveni el la kunteksto. Sed la pli supre cititaj kaj similaj apartenas al tute alia kategorio.

(1) Krom « mesaĝo » ĉiuj vortoj estas en « Plena Vortaro », 1934. — Red.

Ni prenu la vorton « evento ». Nia lernanto derivis la ideon jam en la elementa kurso el la radiko « okaz- », kiel tion faras ĉiuj slavaj kaj germanaj lingvoj, kaj la nova esprimo « okazaĵo » (eble ankaŭ « okazintajo ») ricevis klaran signifon kaj pro sufiĉe ofta uzado ankaŭ altan gradon de aŭtomatismo (2). Trovinte nun en la gazeto la esprimon « evento » nek ia idea asociado (kontraŭe al tiuj, kiuj konas la latinan « eventum », aŭ la francan « événement », aŭ la anglan « event »), nek la kuntesko donas klaran bildon. La vortaro? « Evento » estas neoficiala vorto kaj ne troviĝas en vortaretoj. Eĉ por tiu, kiu finfine solvas la enigmon, restas subkonscie malagrabla sento pri la instruanto, lernolibro kaj Esperanto.

La instruantoj kaj instruistoj de Esperanto ne povas plu toleri tiun staton. Se la aŭtoroj kaj redaktoroj, la parolantoj kaj gvidantoj respondecas morale pri la normala evoluo de la lingvo, respondecas ni instruantoj de Esperanto pri niaj lernantoj kaj pri ilia lingvoscio. La vivo mem postulas la saman lingvon por la praktika uzado, por la lernolibroj kaj por la instruado. En la listo de oftaj vortoj devas regi absoluta klareco. Neniu kontraŭstaras al sinonimoj, la strukturo de Esperanto mem ja ebligas abundan rikolton. Sed se en konkreta proza traduko oni legas « trista bovo », ĉar « malĝoja bovo » aŭ « malgaja bovo » verŝajne ne efikas sufiĉe emocie, tiam io ne estas en ordo eĉ por la plej tolerema esperantisto.

En kelkaj landoj la instruado de Esperanto transpaŝis la fazon de hazardaj kursoj kaj komenciĝis jam la stadio de oficiala aŭ almenaŭ duonoficiala lerneja instruado. Se Esperanto estas planlingvo devas inter la lerneja vorttrezoro kaj la ĝenerala vortuzo en la esperantaĵoj regi identeco. Tiurilate nun Esperanto postlamas eĉ al la naturaj lingvoj. Temas do ne pri bagatela demando, sed pri grava metodika problemo.

La instruantoj de Esperanto kaj ankaŭ la aŭtoroj de lernolibroj limigas la vorttrezoron severe al la oficiala radikaro. Sed nun aspektas, kvazaŭ ili barus la evoluon de nia lingvo, kvazaŭ ili estus la kulpuloj, kiuj malenvias al la lernantoj la nuntempajn vortojn, kiuj sonas al la lastaj tiel mistere kaj pro tio ankaŭ senenhave. Estas interese, ke tiujn vortojn ŝatas ankaŭ slavaj verkantoj kaj parolantoj. Mi dubas, ke tion kaŭzas la sopiro al pli granda precizeco. La demando estas studinda. Mi aŭdis ekz. plurfoje el la buŝo de bona sed nur elemente klerigita maljuna esperantisto la frazon « tio estas nekontestebla pruvo (fakto) ». Ĉu li havas ĝin el P.V.? Ĉu li ripetas aŭditan aŭ skribitan neologismon? Kial ĝuste tiu formo de la radiko « kontest- » enkapiĝis? Ĉu regas iuj leĝoj pri pli facila alproprigo de novaj radikoj ol pri lernado de derivaĵoj? Nur detala studo de tiu ĉi fenomeno (regionoj, gazetoj, ofteco, uzantoj laŭ nacieco kaj instruiteco, komparo kun samtempe uzitaj sinonimoj ktp.) povas klarigi la plivastiĝon de neologismoj. Sendube kaŭzas la regionan uzon de neologismoj plej ofte la imitado. En iu esperanta oficejo mi ripete aŭdis la vorton « molesti ». Ĝi ne apartenas al oftaj vortoj, tamen la nova vorto pro ofta uzado de unu persono ŝajne infektis la aliajn esperantistojn, kiuj pli facile memoris la novan radikon ol la priskribon « daŭre ĝeni », « malkomfortigi ». Se unu persono tiel rapide influas la ĉirkaŭaĵon, ne estas malfacile diveni, kian efikon havus la lernolibroj, se la aŭtoroj senpripense uzus neologismojn. Nur la disciplino kaj la respekto al la decidoj de la Akademio de E. detenis ilin de tio. Ankaŭ la aliaj asertas la samon, sed inter ilia diro kaj faro estas maro.

La neologismoj por la malvortoj ne estas tiel danĝeraj, ĉar escepte de du, tri (trista, obskura, povra...) ili limiĝis al la poezio. Tamen ankaŭ la limigo al poezio devas meditigi tiujn instruistojn, kiuj postulas por ĉiu lernanto de Esperanto post la elementa kurso ankaŭ daŭrigan kaj se nur eble ankoraŭ superan kurson. La lastaj pritraktu nepre la esperantan poezion kaj altan literaturon, kiel tio okazas ĉe instruado de aliaj lingvoj. Nun almarŝas la

(2) Ĉu « evento » signifas ekzakte: « okazaĵo »? Pli ĝenerale, laŭ mi, kulpas ne tiuj, kiuj uzas maloftajn vortojn, sed tiuj kiuj snobisme uzas ilin anstataŭ la kutimaj vortoj. Ekz-e uzi « kontinui » anstataŭ « daŭri » estas tipa eraro. — Red.

dudek sinonimoj por la malvortoj, tute neatendite, kvazaŭ « dio el la maŝino ». Ĉu ne estus pli oportune, konigi ilin al la lernantoj jam pli frue en formo de belaj kaj valoraj versaĵoj originalaj, sed absolute ne pli frue, ol la koncernaj fundamentaj malvortoj jam aŭtomatigiĝis. Ĉiu natura lingvo estas instruata tiamaniere. La infanoj ekkonas la nekutimajn, elvokivajn vortojn hejme haj en la lernejo, lernante poeziaĵojn parkere. Ĉi tiu natura vojo forviŝus ankaŭ en Esperanto la artefaritan diferencon inter ambaŭ grupoj da vortoj. La nuna situacio estas artifa kaj kontraŭ la lernantoj nesincera, eĉ malhonesta. Por konservi la falsan aserton pri senpena akiro de Esperanto (3) ni kaŝas antaŭ la lernantoj la ofte uzatajn neoficialajn vortojn, kiujn aliflanke aplikas esperantistoj, por dokumenti aserton, ke Esperanto estas samnivela kun aliaj lingvoj. Du kontraŭstarantaj konceptoj, tamen ambaŭ konstruitaj sur falsaj premisoj. Unue la oficialigo de kelkdekoj de neologismoj ne influus senteble la ellernon de Esperanto, kaj due konataj lingvistoj kaj recenzistoj de grandaj nacioj jam avertas la aŭtorojn antaŭ la ĉiam pli granda komplikoj, preskaŭ konfuzo en ilia lingvaĵo, celante atingi lingvan efikon je kosto de klara enhavo.

Sajnas al mi, ke eblas kunigi ambaŭ tendencojn. Mi donu ekzemplon. Kvankam Churchill estas ne nur granda ŝtatestro sed ankaŭ granda verkisto, li tamen subtenis per ĉiuj fortoj la simpligon de la angla lingvo en la formo de Basic English. La projekto fiaskis, ĉar nur planlingvo povas esti simpla kaj tamen perfekta, nur ĝin oni povas faciligi aŭ riĉigi laŭdezire. La lastan aserton pruvas niaj verkantoj abunde. Oni povas nur bedaŭri, ke la principo de simpligo estas nun preskaŭ malatentata, kvankam la evoluo montras tiurilate interesajn faktojn.

Simile al la principoj de neceso kaj sufiĉo en la vortfarado oni povus eble starigi paralelan principon rilate la esperantan vorttrezoron. La sekvantaj postuloj ne estas io nova. Grava estas nur la samtempa akcento de riĉigo kaj simpligo.

Principo de riĉigo de Esperanto. — En la vortaron de Esperanto oni povas enkonduki novan radikon, se tion nepre postulas la ideo reprezentota kaj se la nova radikoj signifas necesan pliriĉigon de la lingvo faka aŭ literatura.

Principo de simpligo de Esperanto. — Oni ne uzu radikojn, kiujn oni povas sufiĉe klare esprimi per derivitaj aŭ kunmetitaj vortoj.

Inter ambaŭ principoj devas regi ekvilibro. Pri sana limigo de riĉigo zorgas la Akademio de Esperanto, pri konstanta plisimpligo la organizitaj instruantoj de Esperanto, kiuj samtempe klopodu, ke la instrumentado ebligu vivipovan lingvoscion.

Per tia aŭ simila solvo mildiĝus ĉiuj problemoj aluditaj en la artikolo. La Akademio de Esperanto fariĝu iomete pli larĝanima ĉe oficialigo de sufiĉe ofte uzataj radikoj, la ĝeneralaj organizoj dediĉu pli da mono kaj papero al la esploro de vortuzado kaj entute al la uzo de la lingvo, la instruantaro penu ne nur gardi la aplikon de simpla Esperanto sed ankaŭ zorgi pri natura transiro el la lerneja lingvo al la lingvouzo en la vivo. Ĉe bona interkonsento Esperanto ebligas pacan kunvivon de vort-artistoj apud la defendantoj de plej simpla Esperanto.

Kiel ĉiuj lingvoj, apartenas ankaŭ la Lingvo Internacia al du mondoj, al la mondo de libero kaj al la mondo de bezono. La arto kaj la vivo formu egalrajte Esperanton, ke ĝi fariĝu taŭga esprimo por iu ajn celo.

RIMARKO DE LA REDAKCIO. — Ni publikigas ĉi tiun artikolon, kiu prilumas interesan flankon ĝis nun ne tre atentitan de la tiel-nomata problemoj pri neologismoj. Ĉerte legantoj dezirus respondi. Tamen ni aperigos nur la objektivajn, nepolemikajn tekstojn; kaj en la limo de niaj eblecoj, ĉar verŝajne multaj emos diri sian vidpunkton kaj ni ja ne povos ĉion publikigi.

(3) Ĉu la simpla akiro de E-o ne ŝuldiĝas unualoke al ĝia strukturo? — Red.

ESPERANTO en la LERNEJOJ



NOVA GRAVA PROGRESO por la kampanjo "Esperanto Kiel Baza Lingvo"

La lerneja direkto de SUOMIO decidis en junio 1958 aprobi novan studplanon por la mezlernejo de la urbo SOMERO. Tiu studplano fiksas, ke la gelernantoj de la unua klaso (11 ĝis 13-jaruloj) estu dividitaj en tri grupojn. Unu el tiuj grupoj havu kiel devigan temon Esperanton (kiel solan fremdan lingvon dum 6 lecionoj en ĉiu semajno, dum la tuta studjaro. Esperanto estas instruata en tiu klaso, por ke tiu lingvo poste servu kiel bazon por la german-kaj angla-lingva lernado. Sekve la postaj klasoj ne havos instruadon pri esperanto. Sed por ke la lernantoj ne forgesu sian scion de esperanto, la studplano antaŭvidas, ke en la dua kaj tria klasoj unu temo, ekzemple geografio, estu instruata per esperanto.

La supra decido de la finna lerneja direkto estas la rezulto de tutjaraj skribaj kaj buŝaj traktadoj de niaj gratulindaj s-roj Setälä kaj Vikki kun pluraj ĉefoj kaj subĉefoj de la direkto. La fundamento de la sinturno al la aŭtoritatuloj estas la principoj esprimitaj en la kampanjo « Esperanto kiel baza lingvo ». El tiu ĉi sukceso en Suomio montriĝas, ke tiu kampanjo — se ĝi estas lerte kaj diplomate adoptita al la enlandaj cirkonstancoj — povas konduki al tre konkretaj rezultoj. La plej interesa parto de la studplano fiksita de la direkto, estas laŭ mi, ke la finnaj aŭtoritatuloj — akceptinte esperanton kiel bazan lingvon — ne hezitas tuj aranĝi la studplanon tiel, ke la lernantoj ne forgesu la jam lernitan esperanton (per la instruado de geografio pere de esperanto).

Instruistoj, kiuj volas informiĝi pri la maniero, laŭ kiu niaj finnaj amikoj kondukis la proponon al sukcesa aprobo (inkluzive petskribo, atestoj pri la pedagogia valoro de esperanto, k.t.p.), povas ricevi la kompletan materialon de mi.

E. MAIMGREN,
Heleneborgogatan, 6, Stockolm.

Eksperimento pri instruado de fremdaj lingvoj, inkluzive de Esperanto, al infanoj de unuagradaj lernejoj en Arnhem (Nederlando).

Je la 22a de septembro oni komencis en Arnhem (Nederlando) en 7 unuagradaj lernejoj eksperimenton pri instruado de modernaj lingvoj al 8-jaraj infanoj (el la tria klaso). La eksperimenton iniciatis la Fondaĵo « Arnhem-Eŭropo », kiu okazigis en 1956 kongreson pri la lingva problemo en Eŭropo. Temas pri 4 lingvoj: angla, franca, germana kaj Esperanto.

La instruado okazas per la t.n. rekta metodo. Oni ne instruas gramatikon kaj la bildon de la skribita vorto. Dum kvin tagoj ĉiusemajne oni donas lecionojn po unu kvaronhoru.

La geinstruistoj devenas el la landoj kies lingvojn ili instruas al la gelernantoj. La Esperanto-instruistino estas la denaska Hungarino, S-ino Burgler.

Oni formis kiom eble plej malgrandajn klasojn: ne pli ol 15 infanoj samtempe. Por ke oni akiru kiom eble plej bonan opinion pri la kapableco de la infanoj lerni fremdan lingvon, oni instruas samtempe en du lernejoj kun gelernantoj el diversaj sociaj medioj. Estas ja supozeble ke infanoj el pli malpli intelektulaj medioj hejme pli kontaktiĝas kun fremdaj lingvoj ol infanoj el ekz. laboristaj medioj.

Esperanto estas instruata en lernejo situanta en urboparto, plejgrandparte loĝata de laboristoj (1). La dua lernejo, kie oni komence intencis krome instrui Esperanton, bedaŭrinde elviciĝis, ĉar la gepatroj rifuzis kunlaboron, kiam ili eksciis ke temas pri Esperanto! Oni nun klopodas trovi anstataŭntan lernejon.

(1) Adreso: Unuagrada lernejo n-ro 6, Bonte Wetering, Arnhem-Nederlando.



RAPORTO PRI LA ESPERANTO-PROVKLASOJ

(sub aŭspicioj de INSTITUCIO « ESPERANTO ĈE LA INSTRUADO »)

HAARLEM

Beatrix-Lernejo- 4a Lerno-Jaro

Kursgvidant(in)o: S-ino C.J. Staritsky-Sevenhuisen.

Lerno-Libro: « Sub la verda standardo » progresiva metodo.

Nombro da Kursanoj: 16 gelernantoj (9-10 jaraj). — Rezultato: bonaj gelernantoj; la meznombra poento estis 7. La klaso kunlaboris kun « Graĵnoj en vento ». La klasinstruisto kaj la antaŭa klasinstruitino ĉeestis la lecionojn kaj komencas fariĝi bonaj Esperantistoj! La ekspoziciitaj esperantaĵoj de « Graĵnoj en vento » altiras la intereson de la aliaj infanoj kaj de la instruistoj. La lecionoj estis dufoje semajne.

Van 'Zeggelen-Lernejo - 4a lerno-jaro

Kursgvidant(in)o: S-ino C.J. Staritsky-Sevenhuisen ĝis la mezo de aprilo; anstataŭantino: S-ino A.H.C. Kwantes-Munnik.

Lerno-Libro: « Sub la verda standardo » - laborilo 1.

Nombro da Kursanoj: 52; dividitaj en 2 grupoj, kiuj ricevis po 1 horon da instruado semajne. — Post Pasko restis 44 gelernantoj kaj je la fino de la kurso 28. Rezultatoj sufiĉe bonaj. La du kursoj estos daŭrigataj. La infanoj komencis korespondi.

DEN HAAG

Montesori-Popollernejo - 3a, 4a kaj 5a klasoj

Kursgvidant(in)o: S-ro J. Verbruggen (instruisto de la lernejo).

Lerno-Libro: Sub la verda standardo -laborilo 1 kaj parto 2.

Nombro da Kursanoj: en oktobro 29 (8-11 jaraj). — Je la kursfino en julio restis ankoraŭ 19 gelernantoj. Rezultatoj: 9 bonegaj; 3 bonaj kaj 7 sufiĉaj. La kurson daŭrigos 13 infanoj. Kelkaj jam korespondas kun infanoj el Danlando kaj Germanujo.

EDE

Prot. Kristana Popollernejo - 4a kaj 5a klasoj

Kursgvidant(in)o: F-ino J. L. Putto, instruitino de la lernejo.

Lerno-Libro: Sub la verda standardo - laborilo 1.

Nombro da Kursanoj: 22 en septembro (9-11 jaraj). — Je la fino de la kurso restis ankoraŭ 15 gelernantoj. Versajne 13 infanoj daŭrigos la kurson. La infanoj komencis korespondi.

's-HERTOGENBOSCH

Katolika Knabina Lernejo - 5a klaso

Kursgvidant(in)o: F-ino L. Gloudemans.

Lernolibro: Sub la verda standardo - laborilo 1.

Nombro da Kursanoj: en septembro 15 (11-12 jaraj). — Je la fino de la kurso restis 12 infanoj. La kurso estas daŭrigata en septembro.

EMEWARDEN

Komuna Popollernejo - 5a klaso

Kursgvidant(in)o: S-ro G. de Vries.

Lerno-Libro: La ned. traduko de la dana « Nia Mondo ».

Nombro da Kursanoj: en oktobro 42 (10-12 jaraj). — Entute 15 lecionoj estas pristuditaj. Pro malsaneco de la gvidanto la kurso ne povis funkcii regule. Je la fino restis 18. Rezulto: 2 bonegaj; 8 bonaj, 8 mezbonaj. Oni intencas daŭrigi.

VELP

Poppollernejo - 6a klaso

Kursgvidant(in)o: S-ro J.F. Benink.

Lerno-Libro: Sub la verda standardo - laborilo 1.

Nombro da Kursanoj: 10 gelernantoj (11-12 jaraj). — La infanoj ricevis po 2 lecionojn semajne. La kurso komencis en oktobro 1957 kaj finis en junio 1958. En 5 familioj la gepatroj studis hejme kun la infanoj. La lernejestro estis interesita. La kurso ne estos daŭrigata ĉar la infanoj vizitos alian lernejon.

ĈU ONI BEZONAS ENKONDUKI ESPERANTON EN LA LERNEJOJN

Kaŭze de la skribado pri Esperanto en taga preso kaj rilate la radiodissendojn en Esperanto, la gepatroj kaj la lernantoj ofte donas al mi la demandon: Kial oni ne enkondukas Esperanton ankaŭ en la lernejojn? Ĉar tiaj demandoj estas donataj ĉiam pli kaj pli ofte, mi opinias, ke estus necese en rondo de pedagogoj kaj fakaj sekcioj de la societoj de instruistoj, instruantoj kaj profesoroj serioze pritrakti la jenon:

Cu Esperanto kiel ankaŭ la aliaj fremdaj lingvoj havas sian edukan kaj instruatan valoron?

Se Esperanto havas la bezonatan edukan kaj instruatan valoron, ĉu oni povas ĝin enkonduki en la lernejojn kiel novan lernejan objekton aŭ oni povus dum transira periodo enkonduki ĝin kiel liberan aktivecon de la lernantoj?

Cu Esperanto ne povus servi kiel bazo kaj enkonduka lingvo por kompreno kaj pliprofundigo de la gramatiko kaj preparo por la lernado de fremdaj lingvoj?

Oni devus postuli de la fakuloj, kiuj funde konas Esperanton ĉiun bezonatan dokumentadon, el kiu oni povus vidi, kiaj estas en tiu rigardo faritaj eksperimentoj ĉe ni kaj en la cetera mondo kaj kiaj sukcesoj estis atingitaj.

Se ĉe ni Esperanto estas instruata jam en 50 lernejoj, kiel asertas la esperantistoj, oni devus esplori la valoron de tiu laboro kaj taksi ĝin el pedagogia kaj fakaj flankoj.

Oni devus esplori ankaŭ tion, kiom da instruistoj ekzistas, kiuj plene regas Esperanton kaj por kiu ŝtupo de la lernejo estas kvalifikitaj tiuj instruistoj.

Se oni trovos ke Esperanto havas pozitivan kaj vere valoran soci-politikan, kulturalan kaj instruatan karakteron kaj ke estus bone enkonduki ĝin en niajn lernejojn en iu ajn maniero, oni devus rilate al tio pritrakti ankaŭ la demandon pri plua formado de instruistaj staboj por regula instruado de tiu lingvo.

Ciuj menciitaj demandoj estas tre aktualaj, ĉar post akcepto de la nova Leĝo pri la lernejoj oni devos en la limo de unu jaro krei la bazan instruplanon kaj programon por la popollernejoj, kaj en harmonio kun ĉi tiu plano kaj programo la unuopaj respublikoj faros siajn planojn kaj programojn, en kiuj devus trovi sian lokon ankaŭ Esperanto. Tial mi proponas, ke la klerigaj agantoj dum siaj kunvenoj en fakaj societoj, en instruistaj kunsidoj, lernejoj komitatoj k.t.p. kune kun aliaj demandoj serioze pritraktu ankaŭ ĉi tiun demandon de enkonduko de Esperanto en niajn lernejojn kaj ke ili en « Skolske novine » kaj cetera gazetaro publikigu siajn opiniojn, decidojn aŭ proponojn pri tiu demando, ĉar tiel ni ricevos novan dokumentaron pri Esperanto, kiu en nia socia realo ĉiam pli evidentiĝas kiel elstara aferaĵo, kiun ni ne povas nur tiel supraĵe preteriri, ĉar ankaŭ Esperanto povus eble ludi tre pozitivan rolon en la edukado de niaj infanoj kaj junularo.

F. F.

Elkroatis F. Novljan.

Ci tiun artikolon publikigis « Skolske novine » (n-ro 23), oficiala organo de la instruistoj, instruantoj kaj profesoroj en Nacia Respubliko Kroatoj (Jugoslavio) kiel iniciaton al publika diskuto. Ni ĝin aperigas pro ĝia graveco kaj la diskuton plilarĝigas al la tuta mondo. Temas pri la fina venko de Esperanto en Jugoslavio. Dum unu jaro la decido devos esti farita. Tial ni insiste petas ĉiujn kompetentajn esperantistojn nepre partopreni la diskuton kaj siajn kontribuojn al ĝi publikigi en nacilingvaj gazetoj ĉu pedagogiaj ĉu ĝeneralaj. La koncernajn publikigaĵojn bonvolu sendi al ni en du ekzempleroj. Pro la sukceso tio estas tre bezona. Ni antaŭdankas kore.

La redakcio.

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

Universala deklaro pri Homrajtoj

La simpligita teksto de la Deklaro, en Esperanto, eldonita de I.L.E.I. estas havebla, po 12 ekzempleroj, kontraŭ 1 internacia respondkupono, de la Sekretario de I.L.E.I. 183, Woodlands Park Road, Birmingham, 30, Anglujo aŭ de la Prezidanto de I.L.E.I., F-ino Jeanne Dedieu, 70, Avenue Victor Ségoffin, Toulouse, Francujo.

La celo estas helpi al geinstruistoj, kiuj volas pritrakti la Deklaron ĉe lernejoj.

Geonkloj Esperantistaj

Sub la aŭspicio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (I.L.E.I.) starigis projekto por kuraĝigi kaj helpi al junaj gelernantoj de Esperanto.

S-ro J. H. Sullivan, 3, Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Anglujo, akceptis la administradon.

La devoj de la geonkloj estas jene :

- Korespondi kun la geinfanoj kaj ankikiĝi kun ili ;
- Gvidi ilin lingve korektante iliajn erarojn laubezone ;
- Teni ilian intereson pri Esperanto kaj « eduki » ilin pri la « Esperanto Komunumo » ;
- Memori Kristnaskon kaj /aŭ la naskiĝtagon, sendante taŭgan donaceton je tiu okazo.

Invito al Ĉiuj Gesamideanoj

1) **Al Plenaĝuloj.** a) Proponu vin kiel onkl(in)o, sendante vian nomon kaj adreson al S-ro Sullivan. Diru kiom da genevoj vi volas akcepti.

b) Se vi estas patr(in)o aŭ instruist(in)o, instigu viajn infanojn skribi kaj peti onkl(in)on.

2) **Al Geinfanoj.** Skribu letereton al S-ro Sullivan, kun, se eble, respondkupono, kaj petu onkl(in)on. Diru vian aĝon.

3) **Al Ĉiuj,** kiuj subtenas la ideon de la skemo. Via financa subteno multe helpos.

Tabelo de instruistaj ferioj

laŭ Centra Oficejo por Vizitoj kaj Interŝanĝoj Edukaj Britujo, nov. 1956

Lando	Kristnasko	Pasko	Somero
Austrujo	1 semajno.	1 semajno.	de ĉ 15 julio ĝis 10 sept.
Belgujo	10 tagoj.	2 semajnoj.	de ĉ 15 julio ĝis 1 sept.
Danlando	10 tagoj ĝis 2 semajnoj.	1 semajno.	de ĉ 20 junio ĝis 15 aug.
Finnlando	1 monato.	1 semajno ĝis 10 tagoj.	de 1 junio ĝis 1 sept.
Francujo	ĉ 23 decembro ĝis 2 januaro.	2 semajnoj.	de frua julio ĝis fino de sept.
Germanujo	2 semajnoj inter 19 dec. kaj 8 jan	2 semajnoj Pentekosto 10 tagoj.	4 ĝis 5 semanojn inter 26 junio kaj 4 sept.
Italujo	10 tagoj.	1 semajno.	de ĉ 15 junio ĝis 31 a. agosto.
Nederlando	10 tagoj ĝis 2 semajnoj.	10 tagoj.	de 15 julio ĉis unua mardo, sept.
Norvegujo	de ĉ 20 dec. ĝis 12 jan.	10 tagoj.	de ĉ 23 junio ĝis 19 augusto.
Hispanujo	de ĉ 20 dec. ĝis 8 janv.	10 tagoj ĝis 2 sem.	de ĉ 15 junio ĝis 30 sept.
Svedujo	de ĉ 24 dec. ĝis 10 jan.	1 semajno ĝis 10 tagoj.	de ĉ 1 junio ĝis 25 augusto.
Syislando	2 semajnoj.	2 semajnoj.	6 semajnoj inter 1 julio kaj 31 aug. 1 ĝis 2 semajnoj en oktobro.
Krome : Anglujo	2 ½ semajnoj.	2 ½ semajnoj. 1 semajnoj ĉe Pentekosto.	6 ½ semajnoj de la fino de julio.

(En Skotlando estas ferioj iom malsimilaj).

Bulgarujo. Estas 3 lernejaj periodoj : - 15 sept. ĝis 30 dec. (12 taga vintra ferio) ; 13 jan. ĝis 31 marto (?) 10 taga ferio ; 2 aprilo ĝis 31 majo por klasoj I-IV, VII kaj XI - 10 junio por aliaj klasoj. (Laŭ verketo « Grajnoj en Vento »).

Ukrajno. La lernejjaro havas 4 kvaronojn : - la 1.IX ĝis 6.XI 2-a 9.XI ĝis 30.XII (vintra ferio 31.XII ĝis 8.1) 3 a 9.1 ĝis 24.III (printempa ferio 25.III ĝis 31.III) 4a 1. IV ĝis 28.V (somera ferio komencas post ekzamenoj en junio kaj dauras ĝis septembro). (Laŭ verketo en « Grajnoj en Vento »).

NIA DISKUTEJO

pri HO, TIU ĈI NUNA JUNULARO !



Unue, mi opinias ke neniu generacio havas dankemon aŭ respekton por la antaŭa. Junaj dommastrinoj volonte diras : « Panjo ! faru tion por mi. dum mi promenos » sed ili ne diras : « Montru al mi, konsilu min... » Ĉu vi konis multajn junajn instruistojn, kiuj petas informojn de pliaĝuloj ? Pli ofte, ili mokas pri tiuj antikvuloj kiuj ne konas novajn metodojn kaj uzas tiel malnovajn librojn - kaj, mi mem, antaŭ tri dek jaroj...

Kiam maljuna kulturisto donis sian bienon al sia filo, li ne plu rajtas okupiĝi pri ĝi, neniam oni aŭskultas de li konsilojn aŭ avertojn, kaj li malgaje atendas morton, bedaŭrante ke lia saĝo kaj sperto utilas al nenio...

« Mi Satas mian metion kaj ankoraŭ povas fari bonan laboron. Kial vi volas kondamni min al enuo en senokupeco ? » diras la maljuna lignajisto. Ĉar, je iu aĝo oni devas rezigni » kolere respondas la filo, kiu deziras mastri la laborejon. Ĉirkaŭ mi, mi vidas multajn similajn faktojn.


Tiu malbona spirito nun trafas la junularon kiu ankoraŭ bezonas gepatran helpon kaj gvidadon, laŭ nia vidpunkto. Ili opinias, ke ili ne bezonas nin, aŭ ke nia devo postulas de ni plenan sindonon al ili. Ne parolu pri via malfacila juna aĝo. Tiu ne interesas ilin. « Mi pli ofte manĝis ajlon kun pano ol viandon — kial vi toleris tion ? — Kiam, mi, la unuan fojon, aĉetis pudron, mia patrino jetis la skatoleton en la rivereton, dirante: Ĉu vi volas senhonorigi nin ? — Ridindaĵo ! — Mi, ĉiumatene kaj ĉiuvespere, piediris ok kilometrojn trans la riveregon, ĝis mia laborejo — kompreneble, ĉar vi havis nek biciklon, nek publikan veturilon, sed nun, ni havas, kial ne uzi ? »

Ne parolu pri tiaj strangaj vivmanieroj. Estas por niaj junuloj kvazaŭ vi dirus : « Kiam ili malsatis, ili bezonis preni siajn ŝton-hakilojn kaj ĉasi ursojn ». Ĉu vi deziras, ke ili vivu tiamaniere ? Ĉu vi forgesas progreson ? Ili nur forgesas ke la antaŭuloj, ne ili, faris tiun progreson. Mi ne scias kiel igi ilin pripensi. Mi mem, kiam la maljuna vicurbestro rifuzis al mi lokon por la knabinaj bicikloj, dirante : « kiam mi estis knabo, mi iris piede al la lernejo » mi kolere respondis : « kaj, en tiu tempo, ankaŭ la urbestranaj iris piede al la urbodomo, kaj eĉ kun lignoŝuoj ! » Li ridis !

Ĉu ni rifuzos al niaj junuloj la nuntempajn faciligojn, dirante : « gajnu ilin ? » Ne, sed ni postulas respekton kaj dankemon. Saĝnas al mi ke, se tio mankas al ni, estas nia kulpo. La nova edukado postulas por la infanoj kiel eble plej da libereco, sed oni ne igas ilin zorgi pri respondeco. Kiam miaj fratoj, ludante, difektis ĝardenon, rompvis vitron aŭ trafis per ŝtono la kapon de vojiranto, ili sciis kio atendas ilin post reveno hejmen ! Sed, nun, saĝnas, ke tiu libereco estigis rajton fari tion, kion oni volas. Geknaboj ne akceptas riproĉojn, kaj ofte, la gepatroj kverelas kontraŭ la riproĉintoj, kiuj plendas pro domaĝo aŭ insultoj. Plie la gejunuloj, en publikaj veturiloj, en teatroj aŭ sur vojo biciklante tri- aŭ kvar-ope age proklamas : « La mondo estas nia ». Policano diris al mi timi siajn deĵorhorojn ĉe « porjunula spektaklo » « Mi preferas diri nenion kaj ke ili forgesu min ! »

Temas kelkfoje pri grava afero : ŝtelo por vendi kaj elspezi, aŭ nokta promenado kaj akcidento en « pruntita » aŭtomobilo. Ĉiuj, la morgaŭon, parolas pri tio. « Ili estas tro liberaj, ili havas tro facilan vivon » estas la komuna opinio. Kaj, certe tio ĉi estas la vero. La junuloj havas deojn, kiel ni. Ni devas paroli al ili pri tio. Ni devas diri : « vi ne rajtas fari tion, aŭ tion. Ne ĝenu la aliajn sur vojo aŭ en teatro. Mankas mono al mi por via nova robo aŭ por tiu vojago. Ĉu vi deziras, ke al ni manku manĝaĵo, aŭ necesi al via juna frato ? Jes, mi estas maljuna, do, mi ne povos ĉiam labori por vi. De nun, vi devas helpi min... Kaj peni por prepari vian estontecon. » Saĝnas ke kelkaj familioj sukcesas bone eduki siajn gefilojn. Eĉ en modestaj familioj estas ĝentilaj, laboremaj, dankemaj infanoj — Hejme — kaj en lernejo, ni bezonas sciigi; libereco postulas respondecon — pli da progreso aŭ feliĉo postulas pli da peno kaj laboro. Certe ili komprenos. Ili ne estas pli malbonaj ol ni !

R. COSSON



SUR VIAN

CENT ĜOJKANTOJ

de Marjorie BOULTON

Eldonita 1957 de la aŭtoro (1 Inglefield Avenue, High Lane, Surslem, Stoke-on-Trent, Staffs.) 48 p. 18×12,5. Antaŭbildo de Reto Rossetti.

Temas pri miniaturoj, pri etaj poemoj kiuj ĝojas pri la mil kaj unu nenioj de la ĉiutago. La kato de Marjorie Boulton, kompreneble, sed ankaŭ multaj aliaj estaĵoj survoje renkontitaj: bufido kaj lacerto, libelo kaj grilo rajtas kelkajn versojn kompanse por la ĝojo kiun ili donis al nia poetino. Same por diversaj momentoj de la tago kaj jaro, por pensoj — ankaŭ eĉ por la plej rutinaj kaj filistraj aferoj kiel manĝaĵoj: salato, spicoj... aŭ ankaŭ kiel tajpado kaj telefono... En unu vorto, ĉio estas motivo de ĝojo por Marjorie Boulton kaj ŝi volas komuniki tion al ni per amindaj poemetoj en lingvo kristale pura, juvele klara.

Signifoplena estas la enkonduko de la aŭtorino: ŝi nepre montras al ni sufiĉe gravan faceton de la pensosfero, de la filozofio de nia granda verkistino:

« Eble nia unua eraro povas esti, ke ni ne sufiĉe amas nian mondon, ne sufiĉe perceptas ĝojon, kaj tial ne sufiĉe respektas la vivon. Eble ni devas lerni, kiel ami la mondon, por ne detrui aŭ sangkovri ĝin. »

Tre ofte ŝi « verkas pri malgajaj temoj kaj pri problemoj doloraj » kaj legantoj de IPR jam ofte havis la avantaĝon ŝin legi kaj aĉerci. Mi ja povas diri, ke ĉiufoje mi rekonis, mi sentis tra la supraĵa malgajo de siaj artikoloj, ion pozitivan, ion multe pli profundan: potencan ĝojon; la ĝojon al la bono, la ĝojon al la kreo; la nesubpremeblan ĝojon al la kreo de l'bono! Kaj iasence ĝojo kaj kreo estas ja la sama. Legu la « Cent Gojojn »: ĉiupaŝe vi renkontos la ideon de kreado; de kreado mikŝita kun tiu de ĝojo: krea ĝojo kaj ĝoja kreado! Kaj certe per tiu nova verko, ŝi helpos al siaj « homaj gefratoj pli konscii pri siaj grandaj kaj malgrandaj ĝojoj, pli serĉi tiujn floretojn en la rokfendaĵoj ».

A. A.

★

MEDALIONOJ

de Zofia NALKOWSKA

Tradukis Tadeusz HODAKOWSKI; enkonduko de Henryk Bereza tradukita de Isaj Dratwer. 11 paĝoj 11,5×17. Prezo 350 fr. Eldonejo « Polonia » Warszawa Pollando.

« Medalionoj », titolo, kiu revigas pri juveloj, pri bareliefoj, pri belegaj arkitekturaĵoj. Sed en la ovalo de tiuj medalionoj estas ĉizitaj monstraj figuroj. Ĉiu medaliono montras aspekton de raciigita krimego. Kaj korprenmiga estas la frazo: « Homoj al homoj preparis tiun ĉi sorton. »

Tiu libreto estas dokumento altvalora pri la kruelaĵoj faritaj de homoj blinde servantaj la teruran « ŝtatan racion » de la nazi-reĝimo sur la pola teritorio. Milionoj da homoj mortis ĉar ili « malutilis » al la ŝtato. Ili mortis amase, sufokitaj, bruligitaj; kaj multajn el ili, kies vivo malutilis, oni utiligis mortantajn aŭ mortintajn. Ili estis « transformataj al krudmaterialo kaj komercaĵo ».

Malgraŭ ke, dum la legado, la koro rapide batas pro kompato kaj malespero oni neniam sentas malamon aŭ revenĝdeziron. Tiu libreto estas senpatosa kaj objektiva. El inter la kruelaĵoj elkreskas floroj: la bonkora « malamiko », la

LIBROBRETON

kuraĝa kuracisto kiu riskas sian vivon por savi infanon. Tiuj, kiuj, leginte tiun dokumenton iĝus malesperemaj, komprenos, ke tiuj floroj ebligas grandan esperon, ke malgraŭ la kolektiva frenezo, homoj konservis sanan menson kaj, ke dank'al ili ĉio estas savebla.

La traduko estas bona malgraŭ kelkaj prezeraroj. Tiu verketo estas rekomendinda ĉar ĝi pensigas pri la neceso unuigi la homojn. Tiaj krimegoj malaperos nur kiam malaperos la kialo: homa obeemo al fanatikaj estroj pro manko de monda edukado.

P. BABIN.

★

Manuel pour l'enseignement des Sciences

(Lernolibro por instruado de la sciencoj) eldonis U.N.E.S.C.O., 19, avenue Kléber, Paris XVI^e, 600 fr.

Ni legis en « L'École Liberatrice » pri apero de tiu libro, kiu donas konsilojn al la klasestroj — kiuj scipovas la francan — kiel konstrui kaj uzi simplajn aparatojn por la instruado de la fizikaj kaj naturaj sciencoj. Verŝajne tiu indiko utilos al niaj legantoj.

★

INFAN-LITERATURO

ALKO KAJ SUNA EN SIAJ DU DOMETOJ de Verna Hills - 1958 - Eldonita de Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado - Tradukita el la angla de Rüdiger Eichholz - 78 p. 14×21 - ilustrita.

Jen nova libreto intence tradukita por denaskaj esperantitoj. Ĝi krome prezentas provon de nova stilo de porinfana literaturo. Kial prezenti kruelaĵojn kaj fantaziaĵojn, eble tre streĉaj por la infanoj animoj: veran edukon ili bezonas, kaj ekzemple 3- kaj 4-jaruloj bezonas konatiĝi kun la ĉirkaŭa mondo.

La etaj okazaĵoj de la ĉiutago bezonas esti klarigitaj iom post iom kaj per simpla lingvaĵo. La naturaj fortoj same kie la homaj rilatoj, fiziko kaj moralo, devas esti atentitaj.

Por tiu celo, 22 rakontoj pri du geknaboj, kun po unu ilustraĵo efektive kapablas teni la atenton de junaj infanoj. Tre rekomendinda al ĉiuj edukistoj kaj al gepatroj de denaskas esperantistoj.

BIENBESTAJ AMIKOJ. Rakonto kaj bildoj de W.P. Gottlieb. La etaj oraj libroj. La esperanton tekston eldonis Esperanto-Press, Oakville, Ontario, Kanado, 24 paĝoj 17×20,5 Prezo:


Jen Esperanton-Press daŭrigas sian laudindan entreprenon vestante anglajn librojn per esperantaj tekstoj intence por niaj denaskaj esperantistoj kaj aliaj junaj esperantistoj.

Ĉi tiu prezentas al ni bonan serion da belaj kolofortoj pri ĉiuj bestoj de farmbieno. Akompanas tre simpla teksto tre taŭga por junaj infanoj kaj diklitere presita.

Nepre rekomendinda.

(Por pli da detaloj pri la entrepreno, vidu I.P.R. 1958, n° 1 p. 14).

Ĉiuj recenzitaj libroj estas mendeblaj ĉe la libroservo de G.E.E.



IMITINDA Somera Esperanto-Seminario !

Broc, Svislando, 21-31 Jul. 58

Sub la aŭspicio de « KIMIL » kaj « *Graĵnoj en Vento* » okazis en tiu ĉi jaro tre sukcesa Esperanto-Seminario kun 44 partoprenintoj el 5 landoj (Svisio, Francio, Germanio, Jugoslavio kaj Hungario) en la belega svisa montarregiono Gruyères.

La organizan laboron faris s-anoj Marcel ERBETTA, instruisto en Bienne-Biel kaj Leo LENTAIGNE, franca pedagogo, kun granda lerteco kaj entuziasmo.

La celo de la dektaga seminario estis pritrakti gravajn pedagogiajn problemojn ekzerci la lingvon, fari ekskursojn kaj ĉie propagandi Esperanton per ĝia praktika aplikado.

Ĉiutage antaŭtagmeze okazis prelegoj kaj lingvaj ekzercoj, dum kiuj kelkfoje evoluis tre vigla, viva diskutado. Speciale kontribuis al la sukceso de la seminario s-anoj Rudolf LIKAR el Ljubljana, Leo LENTAIGNE el Montpellier, G. MUSSIER el Moulins kaj Willy BRANDENBURG el Münster. La superan kurson de Esperanto gvidis s-anoj Leo LENTAIGNE kaj D-ro J. KONDOR el Hungario.

Kun la infanoj diverslandaj okupiĝis ĉefe la familioj BRANDEBURG kaj GENTE.

Inter la diversaj vizitoj, kiuj estis jam antaŭfiksitaj en la programo, menciinda estas la vizito al la mondfama ĉokoladfabriko *Nestlé* en Broc, kie ni povis ne nur rigardi la procedon de la ĉokoladfabrikado sed eĉ abunde gustumi la plej diversajn kaj plej delikatajn produktojn de la fabriko, ĉe riĉe provizita tablo. Fine, ĉe la eliro ĉiu vizitanto ricevis memore skatolon da pralinoj kaj belan, ilustritan pk-on pri la fabriko. Tre interese estis por ni ĉiuj vidi la faradon de la fama svisa fromaĝo en iu proksima ĉaledo (granda, montara, primitiva bovinejo, kiu ĉie en la svisaj alpoj estas videbla, kun sia karakteriza fumbubo !)

Mirinde bela estis la promonado en la valo de la kristalpura rivereto Jogne apud Charmey kaj vekis nian admiron la profunda, verde brilanta artefarita lago en Charmey.

Ege instrua kaj interesa estis por ni la vizito al la fama kastelo de Gruyères, kiu iam ludis gravan rolon en la historio de la regiono.

Neforgeseble belega estis la ekskurso al la montoselo Tzermont, kiu estas proksimume 1756 m. alta, kaj de kie ni povis ĝui admirindan panoramon sur ambaŭ flankojn de la monto. Ni vidis de tie eĉ la faman Mont Blanc! Tie ĉi en iu ĉaledo, ni povis gustumi bonegan, freŝan kaprinlakton ! Reveninte atendis nin duonvoje sur la deklivo la grizbarba frato de nia s-ano M. ERBETTA, s-ro Gaston ERBETTA, la fama svisa alpkornisto. Kun kortuŝo kaj melankolio ni aŭs-

kultis lian eminentan kornblovadon, kies voĉo basa vaste plenigis la silentan, majestatan valon...

Bonege sukcesis ankaŭ la tuttaga grim-pado sur la pinton de Dent de Bourgoz kiu estas pr 1800 m. alta. Akompanis nin ankaŭ s-ro G. ERBETTA kaj survoje kaj sur la pinto de la monto plurfoje ĝojigis nin per sia arta kornblovado. Agrablan viziton ni faris ankaŭ al la somerdomo de la belgaj gejunuloj en Broc, kie ni reciproke prezentis unu al la alia belajn naciajn kantojn kaj dancojn.

Pripensiga estis la vizito al la severregulaj kartaŭzianoj en Valsainte, kien nur la viroj rajtis eniri. Strange estis por ni vidi, ke ilia tombejo estas en la interna ĝardeno kaj nur simplaj, nigraj lignokrucoj signas la mortinton, sen nomo... Cion kovris sovaĝa, libere kreskanta herbaro. Ni eksciis, ke la entombigo okazas sen ĉerko, nur en sako.

Lunde, la 28.7 tute hazarde vizitis nin s-ano d-ro BAUR el Bern, kiu samtage akompanis nin dum ekskurso al Charmey kaj survoje afable parolis al ni pri la svisa mallongonda radiostacio kaj Esperanto.

Dum la vesperoj ni gaje kantis kaj dancis kaj ĉi tie mi aparte devas mencii la geedzojn GENTE, kiuj senlace instruis al ni belajn provencajn dancojn kaj kantojn. Generale s-ano Erbetta akompanis ilin per sia violono.

Okazis dum nia restado en Broc ankaŭ interesaj lumbildparoladoj pri vojaĝo al Mar-sejlo, tra Jugoslavio, Germanio, Hungario kaj pri belegaj, koloraj infandeseĝnaĵoj.

En la lasta tago de la seminario mi intervjuis la gvidantajn personojn kaj kelkajn aliajn anojn por mia magnetofono. Sufiĉe bone sukcesis ankaŭ la sonbendigo de la amika kunveno en la domo de la belgaj gejunuloj. Entute mi povas konstati, ke la seminario bonege sukcesis, ĉar ni multe lernis, spertis, eminente amuziĝis kaj amikiĝis. La aranĝo estis modela kiun povus sekvi ankaŭ aliaj kuraĝuloj, kiuj ŝatas Esperanton kaj volas ĝian disvastiĝon.

En la nomo de la plimulto mi esprimas ĉi-loke mian tutkoran dankon al niaj karaj francaj samideanoj, kiuj per siaj aŭtomobiloj ofte liveris nin al la diversaj ekskurslokoj.

Por la venonta somero la saman seminario, en pli larĝaj kadroj, intencas aranĝi la jugoslavaj s-anoj en Pula, ĉe la bela, sunplena adriatika maro. Detaloj pri ĝi sekvos pli poste !

Dr J. KONDOR,
gimn. prof. ĉe la Hungara
Gimnazio en Kastl, Ger-
manio.

ADMINISTREJA ANGULO

Vi jam ricevis 3 numerojn de nia revuo « IPR » Ĉar vi nenion resendis certe vi deziras pagi vian ŝuldon. Mi permesas al mi insisti: tion faru tuj. Je la ricevo de tiu-ĉi 4a n°. Ni ege bezonas la monon, kaj la nepagintoj multe ĝenis la regulan aperadon. Bonvolu, mi petas, tuj pagi.

- ĉu al via peranto
- ĉu rekte al mi per internacia mandato (Vidu N-on 1-a)
- ĉu tra U.E.A. (mencianta la kialon)

Mi jam sendis similan cirkuleron al multaj nepagintoj. Certe okazis kelkaj eraroj kaj mi tre pardonpetas. Ke ĉiu alportu novan abonanton por 1959 a kaj IPR estos savita! Bonan kuraĝon tiucelen!

La IPR-administranto
R. DELAGNEAU

NIAJ GAZETOJ

Vegetarano jaro 22, n° 2 (vintro 57-58). *Organo de Tutmonda Esperanta Vegetara Asocio. Eldonas kaj redaktas A. Andrieu, Salusses par Motalès (Aveyron).*

Jen bele prezentita revueto dediĉita al vegetarismo kaj ankaŭ al fakoj al ĝi iel rilataj kiel etiko, higieno kaj ekonomio.

En tiu numero du interesaj artikoloj pri moralo: morala progreso estas la plej grava afero; ĉiu ajn homo konstante estas infanedukanto... bon — aŭ malbon-influa !! Bona artikolo pri naturkuracado. Respondoj pri vegetaraj demandoj. Pluraj nekrologoj pri N. S. Havkin, fondinto de « Vegetarano » kaj pioniro des E-o en Israelo, ktp... Nedubbele estas, ke se ĉiuj esperantistaj vegetaranoj abonos, tiu utila entrepreno tre disvolviĝos.

La lingvaĵo estas mezbona. Esperanto estas nur ilo. Tute prave. Ankaŭ falĉilo estas nur ilo, sed necesas ĝin akriĝi, se oni deziras bonan servon.

La Verda Vojo (Marto-Aprilo 58) pola dulingva periodaĵo kun altnivelaj artikoloj pri Esperanto, represo de la dua premio de Belarta Konkurso UEA 1957, la 4-lingvan rezolucion de UNESKO, ktp. Ĉiuj artikoloj aperas ambaulingve bedaŭrinde krom la etimologia skizo pri esperanta gramatiko, kiu meritis esti pli vaste legata.

Interesa eksperimento estas la sensupersigna skribo kun uzo de la zamenhofaj surogatoj sed *ni forte protestas kontraŭ la rifuzo de manuskriptoj*, kiuj enhavus supersignojn, t. e. estus, *korekte skribitaj*. Jen demando: kion poloj opinius se ni skribus sen supersignoj: miesiencznik poshwiencony jenzykowi miendzynarodowemu.

Pola Esperantisto n° 2, organo de la Asocio de Esperantistoj en Pollando. Kongresraportoj (Gdansk kaj Marsejlo) Biografia artikolo pri Profesoro Doktoro Odo Bujwid (1857-1942) poezia paĝo kun du aliaj poemoj de Julian Tuwim.

Alvoko el Koreujo. - La Prezidanto de Korea Studenta Esperanto-Federacio bezonas lernolibrojn. Li gvidas 26 fundamentajn kursojn de Esperanto kaj spertas grandajn malfacilaĵojn.

Semanto Taekeng Kim c/o Kyoung Pook Oil Co. Unhydeon, Kim/20, Su Chang-dong, Taegu, Koreujo. Ne estas dirite ĉu oni komprenas alian lingvon, aŭ ĉu la libroj estu nur en Esperanto.

★

NIAJ PERANTOJ

AUSTRA: O. St. R., **Dr E. J. Goerlich**, Wien, IX, Waehringerstrasse 59. Poŝtĉeka konto: 30 461. Jarabono: 32 aŭstraj ŝilingoj.

BRAZILA: **Cooperativa Cultural dos esperantistas**, Caixa postal 3 881 Rio de Janeiro D.F. Jarabono: 90 Kruzeroj.

BRITA: **The British Esperanto Association**, 140 Holland Park Ave., London, W 11. Jarabono: 9 ŝilingoj.

BULGARA: **Bulgara Esperantista Asocio**, Bul. Stalin 40, Sofia. Jarabono: 9 levoĵ.

DANA: **Dansk Esperanto-Ferlag**, Ingemannsvej 9, Aabyhoj. Poŝtĉeka konto: 16 295. Jarabono: 9 kronoj.

GERMANA: **Helmut Rössler**, 22b, St-Martin. Poŝtĉeka konto: 43 357 Ludwigshafen/⁴ Rhein. Jarabono: 5 markoj.

HISPANA: **E. Calvet**, Pl. Gral. Sanjurjo, 7, Tarragona. Konto N^o 956 293 ĉe Banco Espanol de Credito. Jarabono: 55 pesetoj.

HUNGARA: **Martin Lajos**, Esperanto, Bors-u-2, Budapest XII. Jarabono: 24 forintoj.

ITALA: **Eduardo Zumbo**, Casella Postale 226, Torino. Jarabono: 750 liroj.

JUGOSLAVA: **Josip Vajdlj**, Podolje 15, Zagreb. Poŝtĉeka Konto: Gradska ŝtedionica, Zagreb, 40 KB 6, N^o 4 653. Jarabono: 410 dinaroj.

KANADA: **Rüdiger Eichholz**, Esperanto Press, Oakville, Ont. Jarabono: 1,25 dolaroj.

NORVEGA: **Erling Holten**, Leangen i Strinda. Jarabono: kronoj. 9.

NEDERLANDA: **Verbruggen**, Oosterhesselenstraat 560, Den Haag. Jarabono: 3,5 guldenoj.

POLA: **Asocio de Esperantistoj en Pollando**, ul. Kozia 3, Varsovio. Jarabono: 50 zlotoj.

SOVET-UNIA: **Roberto Dvorkin**, Esperanto-Sekcio de Kulturdomo, Leningrad 22, Kirovskij 42.

SUOMA: **Joel Vilkki**, Somero. Poŝtĉeka konto: Tu 60 253. Jarabono. 400 markoj.

SVEDA: **Eldona Societo Esperanto**, Box 7 043, Malmö 7. Poŝtĉeka konto: 578. Jarabono: 6 kronoj.

SVISA: **Grajnoj en Vento**, IV-a 9 485, Marcel Erbetta, 66, rue des Pins, Bienne-Biel 7. Jarabono: 5 svisaj frankoj.

USONA: **Jarvis E. Bush**, 3 700 North 75-th Street, Milwaukee 16, Wisconsin. Jarabono: 1,5 dolaroj.

ALIAJ LANDOJ: Sin turni al nia administranto: **R. Delagneau**, Avrolles, par Saint-Florentin (Yonne), Francio, Poŝtĉeka konto: Dijon, N^o 1448 87. Provizore la landaj perantoj kaj ĉefdelegitoj de U.E.A. peras la abonojn: Jarabono: 500 francaj frankoj, aŭ 17 steloj, aŭ 12 internaciaj respondkuponoj. Ni daŭre serĉas perantojn.